

la 16^{an} de Feb. 1928

17h.

Amiko kara,

Impresegata je la belaj notoj de "Pagliaci"¹ el mia radia aparato, mi ekhavis la deziron iomete babiladi kun vi, mia ŝatata korespondinto + amanto de muziko.

Malvarmumita mi estis + tusante iom nuntempe mi ne povas eliri + do restas en mia "kancelario" kie mi ĝuas solecon, + ripozon + belan muzikon.

Lucien donis la radion al mi je Kristnasko + ĝi alportas multan ĝojon en mian vivon. Eble vi ankaŭ havas ĝin? Sed la plej bonaj radiopostoj estas Londono. Ĝi estas super ĉiuj aliaj - tiel klara! Tamen mi oftege aŭskultas Holandujon, Danujon, Berlinon, Parizon, Stockholm, Varsovion, Katowice (kie estas D^{ro} Broder).

Mi ankaŭ povas aŭdi multajn aliajn urbojn kies² Brunn, Praha, sed iliaj postoj nur havas malgrandajn ondojn + estas pli malfacile. Kelkafoje mi aŭdas Esperantajn paroladojn aŭ lecionojn. Nuntempe, mi aŭdas "La Tosca" - tre bela. Pagliaci, La Tosca, La Vie de Boheme, Werther estas miaj plej ŝatataj operoj.

Kiel vi fartas ĉi-tiun vintron? Ĉiam tiel okupita? pri muziko + pri politikaj aferoj?

Lucien estas pli + pli okupita. Ĉiujn grandajn, famajn procesojn li faras.

Dankegon por via karto + bondeziroj por Nov-Jaro. Mi supozas ke vi ricevis mian leteron + 2 fotojn senditajn la 19^{an} de Dec. por Kristnasko.

Estas tiel bedaŭrinde ke vi ne povis daŭri la korespondon kun mi. Vi baldaŭ forgesos Esp.

Mi intencas iam (?) korespondi kun advokato itala kiun oni rekomendas al mi. Esperu ke li estas taŭga. Sed mi ĉiam prokrastas - mi malŝatas novulojn!

Ho! nun oni ludas: "Dolĉe vekigās mia koro" el Samson kaj Delilah (Saint-Saens). Estas mirinde bela - precipe la violonoj!!!

Tiu-ĉi koncerto estas el Birmingham (Anglujo). Neniam nia hejmo estis tiel ĝoja! + Ĉiu-vespere je la 23 h. L. + ni dancadas je la dancmuziko el la grandaj hoteloj en Londono!! Antaŭ 2 semajnoj, mi havis ricevis amikojn + ni ĉiuj dancis post la vespermanĝo!

Kaj Antverpeno? Ĉu vi kredas ke vi povos iri? Eble estos iom malproksime por vi. Laŭ la diroj, ĝi devos esti plensukcesa. Komence, ili donos du baloj³. Unu por interkonatiĝo + la dua je la fino kiel en Praha. Mi, se mi povus, intencus kostumiĝi en la fama Boulognanino (fiŝkaptistino). Tio rememorigos al kelkaj la unuan kongreson.

Kaj Eveto? Ŝi sendube kreskas en ĝentileco + beleco. Ŝia Patrino estas bela laŭ la portreto ŝia + sendube Eveto al ŝi similas.

Ĉu vi ankoraŭ de nove estis en Praha? Kia belga urbo ĝi estas! Mie tiel bonege rememoras ĉiujn

¹ manskribita noto: "komediante, concavallo"

² francismo, ĉu devas esti "kiel"?

³ ĉu "balojn"?

belajn vidindaĵojn en Praha. Emocie oni travivis tiujn tagojn de la Kongreso. La koncerto en la belega halo + la orgeno - Smetana - la orkestrestro - la intensajn impresojn - la entuziasmon kiujn oni sentis. Ho! estis belaj momentoj en la vivo!

Vivante + skribante kun tiuj rememoroj tiel freŝaj kiel en 1921, mi tute kor'salutas vin, kara korespondinto, esperante ke vi vivas sana, feliĉa + mense trankvila.

Ĉiam la sama

Alice Sergeant